
# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

AÑO XXI - Nº 257

MAYO-JUNIO 1983

**Palaco de Kongresoj de CAZAR, sidejo de la nunjara Hispana Esperanto-Kongreso.**

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

DIRECCION Y ADMINISTRACION

Apartado 119 - VALLADOLID

REDACTOR JEFE

Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40
Tfno: (93) 3338081
BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION

Giordano Moya
Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Pedro Nuez
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz

# ENHAVO


| | |
|---|---|
| 1983-a, 75-Jara fondiĝo de U. E. A. | 3 |
| La unuaj hispanoj en Hungario | 5 |
| Niaj Grupoj | 12 |
| Internaciaj kongresoj kaj kunvenoj | 13 |
| Notas de interés para todos los federados | 14 |
| Eldona Fako de HEF | 15 |
| Memoria de la Fundación Esperanto | 16 |
| Inter[illegible]literatura konkurso | 17 |
| 43 a [illegible]pana Esperanto Kongreso | 18 |
| La F[illegible]o | 19 |
| Hisp[illegible] [illegible] | 20 |
| [illegible]zoj. | 21 |
| [illegible] Nekrologoj | 23 |
| Progr[illegible] de la 43 a Hispana Kongreso | 34 |


Depósito Legal VA 616.—1978
Gráf. Andrés Martín, S. A. - Juan Mambrilla, 9 - Valladolid



# UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Apartado 119
VALLADOLID

**Prezidantino**

María Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C
Tfno. (983) 260086
VALLADOLID-11

**Sekretario**

Luis Hernández García
Adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde, 8, 8º A
VALLADOLID-14

Pagojn sendu al nia Konto
Nº 001 664 0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana 6
Av[illegible] Vicente Mortes
VALLADOLID

**Libroservanto de H. E. F.**

J[illegible] González Suárez
Apartado 119
VALLADOLID

Pa[illegible] por libro servo sendu al unu el la je[illegible] kontoj

**Cuenta Postal 3 118 078**

Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cta. Nº 04[illegible]4 a nombre de
LIBRO SERVO DE LA FEDERACION
E[illegible]A DE ESPERANTO
VALLADOLID

ELDONA FAKO
In[illegible]ión
Pº de la Constitución, 35, 4º
ZARAGOZA 1

ĈEFDELEGITO DE U. E. A.
Juan Azcuénaga Vierna
Gral. Dávila, 127, portal 7, 2º Iz.
Tfno: (942) 339487
C. Postal: 03548531
SANTANDER

H. E. J. S.

Atocha, 98, 4º
Tfno: (91) 2308798
MADRID-12

# 1983-a 75-Jara Fondiĝo de UEA kaj Jaro de la Komunikado




Nuntempe Esperantujo memorigas grandajn eventojn. En 1987-a la centjaran naskiĝon de Esperanto kaj ĉijare la sepdek kvinan jaron de la fondiĝo de UEA.

La unua Kongreso de Esperanto okazis en 1905-a en Boulogne-sur-Mer. En ĝi oni deklaris: «La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu... ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la esperantismo ne respondas». La sekvantajn jarojn okazis kongresoj de Esperanto en Geneve, 1906-a; Cambridge, 1907-a Dresden, 1908-a. La kongreso de Dresden havis specialan signifon, ĉar en ĝi unuafoje okazis faka kunveno de UEA.

Universala Esperanto-Asocio estis fondita de H. Hodler kaj T. L. Rousseau en januaro 1908-a kaj aprobita ĝia Statuto en aprilo: «Sub la nomo de UEA estas fondita asocio, kies celo estas la plifaciligo de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj».

La fondintoj de UEA tiam, parolante en Dresden, demandis «Je kio utilas viaj kursoj, se viaj lernantoj poste disperdiĝas ien ajn? Instruante la gramatikon oni devas instrui la uzon, la organizon de UEA-servoj, la manieron trovi adresojn, peti informojn, komenci interŝanĝon, unuvorte, utiligi la lernaĵojn tuj por internacia rilatado». Hodler kaj Rousseau zorge distingis inter «Esperantisto» laŭ la Buljona deklaro (ĉiu, kiu scias Esperanton) kaj «Esperantiano» (ano de Esperantio, la UEA organizo). Tiuj ĉi lastaj sentas sin solidaraj kaj ĉiam pretaj ne nur utiligi la lingvon por si mem, sed antaŭ ĉio servi kaj helpi al ceteraj realigante en agoj la belan celon de la interna ideo».

Kongreso en Barcelono sekvis en 1909-a tiun en Dresden. La venonta jaro 1984-a fariĝos do la 75-a datreveno de la Kongreso en Barcelono, kiun ni devas memori, kaj kies daton ni devas soleni. La Kongreso okazis en tragikaj cirkonstancoj (post la okazaĵoj de la tragika semajno), sed kun impona sukceso. Oni okazigis la unuan esperantan konkurson «Floraj Ludoj». Zamenhof ĉeestis la Kongreson kaj en privata kunsido de la ĵus fondita UEA, li faris salutparoladon; li diris: «Universala Esperanto-Asocio unuigas do ne ĉiujn esperantistojn, sed ĉiujn esperantismanojn, t.e. ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon». En 1910-a okazigis sian unuan kaj solan memstaran Kongreson en Ausburg.

Tiam, antaŭ la unua mondmilito, tiel same Esperanto kiel UEA vigle kreskis kun la espero, «ke baldaŭ en Esperantio oni vidu modelon de estonta homaro internacie solidara kaj kunlaborema». Sed okazis la unua Mondmilito 1914-a-1918-a. Sekvis la furoro de la totalismoj kaj la dua Mondmilito. La esperantista mondo preskaŭ per du fojoj malaperis, tamen ĉiufoje denove ĝi renaskiĝis. Post la dua Mondmilito 39-a-45-a oni fariĝis pesimisma kaj la revoj pri la baldaŭa atingaĵo: «Nia diligenta kolegaro. En laboro paca ne laciĝos. Ĝis la bela sonĝo de l'homaro. Por eterna ben'efektiviĝos», preskaŭ formortis. Pro la seniluziiĝo tra du mondmilitoj la «interna ideo de Esperanto» tiel same kiel arbo plantita en seka grundo, iom velkis. Se tiam la interna ideo de Esperanto estis iluzia revo, nuntempe en homaro minacata de ruiniĝo per atommilito la revoj de la esperantismo fariĝas plenumendaj devoj kaj nuntempe pli ol iam antaŭe estas necese realigi la pacan ideon per agoj.

En tiu ĉi jaro 1983-a, proklamita de UN Jaro de la Komunikado, oni klare devas konstati, ke UEA havas tutmondan reton de Delegitoj kaj Fakdelegitoj. Tio estas vera fakto de rekta interkomunikado inter homoj kaj inter popoloj pere de la lingvo Esperanto kaj pere de la Esperantista Movado.

Kiel servas la facila mekanika komunikilo sen la lingva instrumento same komprenebla por ĉiuj? Por kio taŭgas elektronika komunikado sen spirito de komprenemo? Preskaŭ por nenio aŭ eĉ por faciligi la mondmilitadon.

UEA naskiĝis por realigi belan idealon. Kvankvam la reva idealismo velkis, nuntempe estas necesa la plenumado de devoj kaj agadoj.

UEA post 75-a jaro de la fondiĝo daŭre kontribuas pli ol kiu ajn teknika komunikilo al vera interkomunikado. UEA havas delegitan reton disvastigitan en la tuta mondo pretan altruisme faciligi interrilatiĝojn, kaj des pli grave la interkompreniĝon, agante senbrue, en konstanta kaj efika interhoma komunikado. UEA pli agas ol teoriumas, ĉar jam pasis la tempo de nuraj deziroj. Sen agado, oni povas diri pri idealoj, ke «ĉio restas penso, sed ne faro» kaj la faroj en tiu ĉi nuntempa kaosa mondo ruliĝanta al pereo pro atommilito, estas ne plu prokasteblaj.


**G. Moya**

# La unuaj hispanoj en Hungario

**Bernard Golden**

## ROMIEPOKA PANONIO

Hispanoj, kiuj ĉeestos la 68-an Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto ĉi-jare, eble scivolas, kiam iliaj samlandanoj la unuan fojon pasis sur la nuntempa teritorio de Hungario aŭ plaŭdis en la akvo de Danubo, pli ĝuste en la parto de tiu granda rivero, kiu fluis tra la antikva romia provinco Panonio*. La plej fruaj arkeologiaj kaj historiaj atestaĵoj datiĝas de la unuaj jarcentoj de nia erao, kiam vasta parto de la meza Eŭropo estis sub la regado de la romia imperio, kaj la hodiaŭa Hungario okcidente de Danubo troviĝis en la provinco Panonio. Kiel, do, Hispanoj atingis la danuban regionon tiutempe?




**Mapo montranta la situon de la romia provinco Panonio (interrompita linio), sude kaj okcidente de Danubo (dika linio). Ĝi ampleksas la parton de la hodiaŭa teritorio de Hungario okcidente kaj sude de Danubo. La strekoj signas la limeson de la romia imperio, kiu en tiu regiono koincidas kun Danubo. Norde kaj oriente de la limeso estis la barbarujo.**

## LA ROMIA ARMEO


Inter ĉiuj metioj kaj profesioj de la antikva Romio, donantaj eblon translokiĝi kaj vojaĝi, tiu de la soldato estis la plej favora. La spino de la imperia armeo estis la legioj, trupunuoj konsistantaj el 5000 - 6000 peze armitaj infanterianoj, kaj kelkaj kavaleriaj unuoj. Legianoj nepre devis esti romiaj civitanoj, sed apud ili estis formacioj de helptrupoj, rekrutitaj plejparte en la nove formitaj provincoj, kie la loĝantoj estis necivitanoj. Estis du specoj de helptrupoj, la kohortoj aŭ malpeze armitaj piedsoldatoj, kaj la aloj aŭ rajdosoldatoj. Ambaŭ konsistis el 500 aŭ 1000 viroj. Laŭ la politiko de la romia armeo, ĉefe rilate helptrupoj, soldatoj estis senditaj ekster la provinco, en kiu ili estis rekrutitaj, por subpremi ribelojn en aliaj provincoj aŭ por funkcii kiel garnizonoj ĉe la limeso* de la imperio, kie militemaj barbaraj popoloj minacis trarompi la landlimajn defendpunktojn por invadi romian teritorion. Krom la frontiero* inter la imperio kaj barbarujo, defendendaj estis ankaŭ landinternaj vojoj gravaj por la komerco inter la provincoj. En Panonio infanterianoj kaj kavalerianoj estis postenigitaj laŭ la Sukcena Vojo, kondukanta de la grava vojnodo **Aquileia** en Italio al **Emona** (= Ljubljana, Jugoslavio), **Poetovio** (= Ptuj, Jugoslavio), **Savaria** (= Szombathely, Hungario), **Scarbantia** (= Sopron, Hungario), kaj post disforkiĝo, jen al Carnuntum (= Deutsch-Altenburg, Aŭstrio), jen al Vindobona (= Vieno, Austrio).

Trupunuoj rekrutitaj sur hispa-


na teritorio ricevis etnan nomon, indikantan ilian devenon. Tiam la formacio estis homogena, sed post pluraj translokiĝoj kaj bataloj en diversaj provincoj for de la patrio, la nombro de soldatoj malpligrandiĝis pro mortoj, dizertado kaj eks-soldatiĝo, do estis necese rekruti denove por kompletigi la etaton. Tiel eniris en tiujn hispanajn helptrupojn fremduloj, membroj de diversaj indiĝenaj popoloj loĝantaj en la regionoj, kie la formacio troviĝis. Ties etna nomo, tamen, restis senŝanĝa.

## FONTOJ DE DONITAĴOJ

Unu el la plej gravaj fontoj de informoj pri indiĝenaj helptrupoj estis la tiel nomataj armeaj diplomoj, atestiloj de eks-soldatiĝo, kiujn ricevis romiaj armeanoj okaze de plenumo de 25-jara servotempo. Sur tiu bronza dokumento estis registritaj la nomo de la veterano, la formacioj, en kiuj li servis, kaj donitaĵoj pri lia civila statuso kaj, eventuale, romia civitaneco. Dua fonto de personaj donitaĵoj estas tomboŝtonoj, kies epigrafa teksto inkludas la nomon de la mortinta soldato, ofte la nomon de la patro kaj de la tribo, la «domon», t.e. la hejmlandon, la aĝon, kiam la viro mortis, la nombron de jaroj en la armeo, la trupon, kaj ankaŭ la nomojn de la parencoj aŭ sklavoj, kiuj starigis la tombomonumenton. Kelkfoje persona nomo estas karakteriza de Hispanio, ĉar ĝi estas trovebla pli ofte en tiu provinco ol aliloke. Sed eĉ se viro menciita en surskribo portas pure italan nomon, li estus povinta akiri ĝin kune kun romia civitaneco. Tria fondo pri la etna konsisto de trupoj en iu regiono estas la brikoj, uzataj por konstruado en kastrumoj*. La taĉmentoj havantaj la taskon fari tiujn brikojn markis ilin per stampilo kun literoj kaj romiaj ciferoj, kiuj formis mallongigon de la nomo de la koncerna trupunuo.



A



B



C

**Ekzemploj de stampaĵoj sur brikoj. A, B C(ohors) I H(ispanorum); C - C(ohors) II H(ispanorum).**

## HISPANAJ TRUPUNUOJ EN PANONIO

La **Legio IX Hispana** estis rekrutita en Hispanio, kaj ekde la regado de Aŭgusto (27 a.K. - 14 p.K.) ĝis 42/43 ĝi kampadis inter la riveroj Dravo kaj Savo ĉe **Siscia** (= Sisak, Jugoslavio), kiu servis kiel la ĉefkomandejo de Tiberio dum la granda panonia milito de 6-9 p.K. Pli malfrue ĝi postenis en **Sirmium** (= Mitrovica, Ju-

goslavio), la tiutempe plej grava urbo en Panonio. Formita en Hispanio estis ankaŭ la **Legio X Gemina**, la 10-a Ĝemela Legio. En 63-68 ĝi postenis eksterprovince en **Carnuntum** kaj poste estis resendita al la patrolando por iom da tempo. Ĝi revenis al Panonio, kaj en proks. 105 ĝia bazo estis **Aquincum** (= Budapeŝto) kaj en 107 **Vindobona.** Tomboŝtonaj surskriboj indikas, ke dum la restado de la 10-a Ĝemela en Panonio, ĝia militistaro konsistis ĉefe el soldatoj de okcidenta origino. Unu el la epigrafaj monumentoj el **Carnuntum** memorigas T. Iulius T. Pa. Vegetus, legianon de la **X Gemina**, kies hejmurbo estis **Augusta Emerita** (= Mérida), urbo apartenanta al la tribo **Paripia**. La epigrafo de lia samlegiano L. Antonius L., informas, ke li mortis 55-jara en **Carnuntum** post 36 jaroj da militservo, kaj lia afrikdevena edzino Octavia Data sekvis lin el Hispanio. Ankoraŭ unu hispano, kiu batalis kun la **X Gemina**, estis L. Livius L. f. Ga. Rusticus Ulia. Li plenumis 26 jarojn en la armeo kaj mortis 45-jara. Tria legio, kiu originis en Hispanio, estis la **Legio I Adiutrix**, la 1-a Helplegio. Ĝia unua eksterprovinca posteno estis Majenco, Germanio, kaj ekde 86 p.K. ĝi troviĝis en la danuba regiono, unue kun bazo en **Sirmium**. Ĉe la fino de la 1-a jc. kaj refoje post 118 ĝi estis en **Brigetio** (= Szóny, Hungario). Dum la regado de Trajano (98 - 117), la Legio **XI Claudia** venis al Panonio el **Vindonissa** (= Windisch, Svislando) kaj restis en **Brigetio** de 100 - 106. Ĝiaj soldatoj konsistis el italaj kaj hispanaj indiĝenoj.

Hispanaj helptrupoj estis starigitaj unue dum la tempo de Aŭgusto, kaj ili estis speciale koncentritaj en Iliriko*. En la fortigitaj kastrumoj de Orientpanonio, la ĉefa emfazo estis sur kavalerio tiel frue kiel la 1-a jc. a.K., ĉar okupis la alian bordon de Danubo surĉevalaj nomadoj armitaj per pafarkoj kaj sagoj.

La unua alo funkcianta en Panonio, **Ala I Pannoniorum**, havis sian bazon en Dalmatio*, unue eble en **Salona** (= Solin, Jugoslavio), la ĉefurbo kaj la plej granda urbo en tiu provinco. Kiel la etna nomo de la formacio indikas, ĝi konsistis el soldatoj rekrutitaj el inter la panonoj, la tribo, kiu donis sian nomon el Panonio. Kvankam ĝenerale la procedo de surloka rekrutado signifis, ke indiĝenoj de aliaj triboj iom post iom anstataŭis la originajn trupanoj, kiuj estis en la formacio, kiam ĝi estis starigita en fora provinco, okazis elstara ekzemplo de inversa substituo. Ne longe post la ribelo de tri panonaj legioj en 14 p.K., amaso da hispanoj estis rekrutitaj en la **Ala I Pannoniorum** kun la celo fortigi disciplinon en la tiea armeo. Tomboŝtono trovita en Salona memorigas, ke Clotius Clutamus, kiu mortis en sia 35-a jaro, servis 11 jarojn en la 1-a Kavalerio de Panonoj kaj venis de hejm- regiono en Hispanio. Aliaj hispanoj en la sama formacio estis Abilus, filo de Turancus, kiu naskiĝis en Lucocadiacus, loko apud la **conventum Lucensium** (= Lugo), kaj la du heredantoj, kiuj starigis lian tomboŝtonon, Bovegius, filo de Veninus, el **Lancia**, kaj Pentius, filo de Doviderus. La unua povis esti aŭ lusitano aŭ asturo, ĉar urboj kun la nomo **Lancia** situis kaj en la provinco Tarakono kaj en Lusitanio. Estas iom da dubo pri la dua heredanto. Laŭ unu fakulo, la adjektivo

sekvanta la nomon, **Aligantiesis**, temas pri loko apud **Savaria**, do li estis panono. Alia aŭtoro opinias ambaŭ okcidentaj keltoj, dum tria erudito, legante **Aligantiensis**, rigardas ilin hispanoj. Abilus, la mortinta soldato, estis 43-jara kaj plenumis 23 jarojn da militservo. Tiu longa periodo de soldatiĝo indikas, ke kvankam lia tomboŝtono estis starigita en Gyalóka (Panonio), li estis rekrutita dum la tempo, kiam la **Ala I Pannoniorum** estis en Dalmatio. En la tempo de Tiberio (14-37) kaj Kaligulo (37-41), tiu ĉi trupo jam estis en Panonio en Gyalóka, sude de **Scarbantia.** Sub la regado de Klaŭdio (41-54) kaj Nerono (54-68) la rajdosoldatoj translokiĝis al **Arrabona** (= Győr, Hungario) ĉe la danuba limeso por protekti la Sukcenan Vojon inter **Emona** kaj **Carnuntum**, kaj ankaŭ la veteranan setlejon* de **Scarbantia**.

La nomo **Ala I Hispanorum**, la 1-a Alo de Hispanujo, estas registrita sur pluraj monumentoj en diversaj lokoj de Panonio. El Hispanio ĝi iris unue al la rejna regiono de Germanio kaj poste, sub Aŭgusto kaj Tiberio, ĝi postenis en Gyalóka, tiel fariĝante unu el la unuaj garnizonaj taĉmentoj en la ĵus konkerita Panonio. En la unua duono de la 1-a jc. p.K. ĝi kampadis ĉe Walbersdorf, Aŭstrio, okcidente de **Scarbantia**, por protekti la vojlinion **Scarbantia Vindobona**, kaj en la fruaj jaroj de Klaŭdio, en proks. 50, ĝi postenis en **Aquincum** kaj restis tie proksimume kvaronjarcenton

**La Ala I Hispanorum Aravacorum,** kies kavalerianoj estis membroj de la aravaka tribo, estis postenigita unue en **Siscia** kaj poste transigita al Supra Panonio, kie ĝi aktivis en proks. 125 p.K. ĉe la danuba limeso en la regiono inter **Arrabona** kaj **Brigetio**. Fine de 149 aŭ komence de 150 la alo iris al Afriko, kaj samjare revenis al Panonio, kie ĝi restis ĝis la militoj kontraŭ la markomanoj en la dua duono de la 2-a jc. Ankoraŭ unu kavaleria formacio portanta la saman etnan nomon, **Ala II Hispanorum Aravacorum**, en la 1-a jc. sub Klaŭdio postenis en Mursa (= Osijek, Jugoslavio), sed kiel 1000-kapa trupunuo pasigis pli longan tempon en **Teutoburgium** (= Dalj Jugoslavio) ekde 80 p.K. ĝis la lasta kvarono de la 2-a jc. Unu el ĝiaj trupanoj estis la hispano Tiberius Claudius Valerius, filo de Brittus, kiu mortis 50-jara malproksime de sia patrolando post 30 jaroj da soldatservo. Brittus estas karakterize hispana nomo. Krom tio, la tomba surskribo informas, ke li estis **decurio** kun dek rajdosoldatoj sub sia komando, kaj li ricevis romian civitanecon sub la regado de imperiestro Klaŭdio. Lia edzino estis Claudia Ianuaria, kaj ilia filino nomiĝis Claudia Hispanilla. Ankaŭ la nomo Hispanilla estas indiko de la hispana deveno de la familio. Ankoraŭ unu veterano de la sama formacio, eble de hispana deveno, estis la patro de Ti. Claudius Cossicus. Tiu mortis 60-jara en **Sopianae** (= Pécs, Hungario), situanta ĉe la militvojo kondukanta de la danuba limeso transverse tra Panonio al **Savaria**.

La helptrupa formacio **Ala II Asturum** konsistis el loĝantoj de la nordokcidenta parto de Hispanio, kies triba ĉefurbo estis **Asturica Aŭgusta** (= Astorga). La alo venis el Germanio kaj nur transire restis en Panonio, unue ĉe **Poetovio** kaj poste en **Aquincum** dum la regado de **Klaŭdio**. Preskaŭ samtempe troviĝis en

tiu urbo ankaŭ la **Ala I Hispanorum Auriana**, sendita tien el Germanio sub la regado de Tiberio. La nomo **Auriana** devenas de iu nekonata **Aurius**. Poste ĝi estis transigita al Norikumo kaj Retio.

Ne tute certa estas la deveno de la **Ala I Scubalorum**. Kvankam ne estas eble identigi la skubulojn, la tribon, kiu provizis tiun ĉi alon per rekrutitoj, kelkaj aŭtoroj opinias, ke ili loĝis en Hispanio. Ilia nacia armilo estis la pafarko. La alo kun 500 rajdosoldatoj estis formita sub la regado de Aŭgusto, kaj probable dum, aŭ mallonge post la kampanjo de Tiberio en 12-10 a.K. ĝi estis



**Tomboŝtono veninta el *Aquincum* de Tiberius Claudius, kun la sola portreto de soldato de la *Cohors I Hispanorum*. Pro la uzo de la genta nomo Claudius, oni povas konkludi, ke ĝi datiĝas de la regado de imperiestro Klaŭdio (41-54). La epigrafo havas la nomon Tunger, gaŭla tribo al kiu apartenis la mortinto. Li estis unu el la indiĝenoj rekrutitaj, post kiam la hispana infanterio forlasis sian patrion.**

venigita en la nove starigitan Ilirikon. Eble post la granda panona ribelo en 6 p.K. ĝi trovis bazon en terkastelo ĉe Walbersdorf, Aŭstrio, laŭ la grava militvojo **Scarbantia-Aquae** (= Baden apud Vieno, Aŭstrio). Unu el la soldatoj de tiu ĉi kavaleria trupunuo estis Ti. Iulius Rufus, kies tomboŝtono estis trovita en Walbersdorf. Li estis 85-jara kiam li mortis post 50 jaroj de militservo komenciĝanta sub Aŭgusto, kaj li fariĝis romia civitano verŝajne dum la regado de Tiberio. Oni supozas, ke la veterano estis hispana pro la nomo Rufus, kiu estas karakteriza; pli ol cent ekzemploj estas registritaj en tiu provinco. Lia filino, Iulia Rufilla, starigis la tombomonumenton. Sur aliaj ŝtonoj el la sama trovloko aperas ankoraŭ kelkaj hispanaj nomoj. Ambatus kaj Calaetus probable venis kun Ti. Iulius Rufus, kiam la **Ala I Scubalorum** estis sendita en Panonion, kaj la edzino de Ambatus nomiĝis Hispana. Pri Petronios Rufus oni scias nur, ke li mortis en sia 20-a vivojaro, kaj la liberigita sklavino Iulia Urbana starigis la tombomonumenton.

Almenaŭ ses kohortoj konsistantaj el hispanoj estas konataj laŭ la nomo **Cohors I Hispanorum**. En la 1-a jc. p.K. unu el ili helpis en la konstruo de kastrumoj, unu ĉe **Scarbantia** kaj alia ĉe **Poetovio**. Stampitaj brikoj faritaj de tiu ĉi kohorto venis ankaŭ el **Carnuntum**. Tiuj lokoj situis ĝuste ĉe la grava Sukcena Vojo, do la ĉefa tasko de la trupanoj estis protekti komercajn rilatojn en tiu parto de Panonio. La **Cohors II Hispanorum Scutata Cyrenaica equitata** estis kavaleria kohorto, kiu aktivis en Iliriko en proks. 29 a.K. kaj en proks. 60

**postenis** ĉefe en la sudo de Panonio ĉirkaŭ **Sirmium**. Jam en la tempo de Tiberio ĝi komencis rekruti panonojn. En 138 aperis en Supra Panonio la **Cohors I Hispanorum Civium Romanorum**, kies titolo indikas, ke ĝiaj soldatoj ricevis romian civitanecon kiel honoron.

**La Cohors I Asturum** estis 500-kapa kohorto, kies rekrutitoj estis asturoj. Ĝi postenis en loko nomata **Astura** aŭ **Asturis** laŭ la etno de la trupanoj. Arkeologoj ne samopinias pri la preciza situo de tiu bazo, kiu troviĝis apud la norikuma-panonia provinca landlimo. La plej probabla loko estas Zwentendorf, Aŭstrio. De la 2-a ĝis la 3-a jc. la kohorto estis en Norikumo* kaj poste iris al **Aquincum**. **Asturoj servis ankaŭ en la Cohors I Asturum et Callaecorum**. La dua etna grupo estis la **Callaici** aŭ **Gallaici**, najbara tribo loĝanta en la nordokcidenta parto de Hispanio, nuntempe Galegio. En la jaro 60 ĝia bazo estis en la parto de Iliriko, el kiu estis formita Panonio. Dua kohorto kun la sama etna konsisto, **Cohors II Asturum et Callaeccorum equitata**, en la 80-aj jaroj de la 1-a jc. estis sub la komando de la armeo de Panonio, kaj meze de la 2-a jc. sub la armeo de Basa Panonio. Kvankam ĝiaj stampitaj brikoj estis trovitaj en diversaj lokoj de Basa Panonio kiel Batina, Jugoslavio, kaj **Rittium** (= Surduc, Rumanio), kaj ankaŭ Brigetio en Supra Panonio, la postena bazo de tiu kavaleria kohorto verŝajne estis Batina.

Ankoraŭ ne elĉerpiĝis la listo de kohortoj kun rekrut-distriktoj en Hispanio, kiuj poste aktivis en Panonio. La rajdosoldatoj de la kavaleria **Cohors I Lucensium equitata** venis el la provinco **Hispania Ulterior**, la plej malproksima Hispanio, en la nordokcidenta parto de la Ibera duoninsulo. Ĝia ĉefloko estis **Lucus** (= Lugo). El Dalmatio la taĉmento estis transigita al Panonio en Proks. 80 p.K. por mallonga restado, ĉar en la sama jardeko ĝi estis sendita al Sirio. Tri el ĝiaj soldatoj menciitaj en tomboŝtonaj surskriboj probable estis hispanoj. Gavillius, frato aŭ soldat-kamarado de Andamionius Andamus, starigis lian funebran monumenton. Ilia kunkohortano, Rufus Angetius, portas la relative oftan hispanan voknomon Rufus, kiu estis pritraktita ĉi-supre. La tribanoj en la ĉirkaŭaĵo de **Lucus** kaj la **Callaeci** estis rekrutitaj por formi ankoraŭ unu kohorton, **Cohors V Callaecorum Lucensium**, kiu troviĝis en Panonio de la tempo de Nerono ĝis la 3-a jc. Meze de la 2-a jc. tiu infanteria formacio komencis la surlokan rekrutadon de indiĝenoj.

En Dalmatio estis trovita altaro deĉidita al la diino **Diana Nemorensis** fare de prefekto Ti. Claudius Claudianus, oficiro de la **Cohors I Bracaraugustanorum**. Li estis membro de romiigita familio el **Tudae** (= Tuy). Surbaze de la altara surskribo kaj hispana epigraf-fragmento kun la nomo **Tudae**, kelkaj fakuloj volas identigi tiun ĉi Ti. Claudius Claudianus kun provincestro de ambaŭ Panonioj, (197-199 kaj 202-206) sub la regado de Septimio Severo (193-211). Tiu kohorto kun hispanaj infanterianoj estis probable starigita sub Aŭgusto samtempe kun la ceteraj hispanaj helptrupoj. Ĝiaj rekrutitoj venis el la tribo **Callaeci Bracarii**, kies ĉefurbo estis **Bracara** (= Braga). Du tomboŝtonaj surskriboj atestas pri du soldatoj de tiu ĉi kohorto, kiu estis de hispana deveno; la nomo de unu ne estas konata, kaj la alia portis la no-

mon Meduttus, filo de Caturo. Ankoraŭ unu okcidenthispana tribo, kies membroj estis rekrutitaj por formi helptrupojn, estis la lusitanoj, kiuj donis sian nomon al la provinco Lusitanio. la **Cohors I Lusitanorum** estis registrita sur armeaj diplomoj ekde la jaro 60 p.K., unue en panonia Iliriko kaj poste en la nedividita Panonio kaj Basa Panonio. Malgraŭ ĝia pli ol centjara restado en la provinco, mankas surskriboj. Same nedokumentita estas la **Cohors III Lusitanorum** dum ties agado en la danuba regiono. En la 2-a duono de la 1-a jc. ĝi postenis en Basa Ĝermanio kaj venis en Basan Panonion post la unua daca milito de Trajano. Soldataj diplomoj mencias ĝin nur post 114.

Kvankam la ĉi-supra listigo de unuoj de la romia armeo rekrutitaj en la provincoj de la Ibera duoninsulo koncernas nur tiujn formaciojn, kiuj servis en Panonio, ĝi tamen donas ideon pri la formado de helptrupoj per la perforta forkonduko de amasoj da junaj viroj el indiĝenaj popoloj, ĉefe tiuj loĝantaj en la nordokcidenta parto de la lando.

(daŭrigota)

# GLOSOJ

**Dalmatio.**—regiono en la nordokcidenta parto de la Balkana duoninsulo, inkludanta Hungarion sude de la rivero Savo, la plej grandan parton de Jugoslavio, kaj parton de Albanio ĝi fariĝis romia provinco, kiam Iliriko estis dividita de Tiberio.

**Frontiero.**—regiono formanta la limon de civilizacio; la plej fora prisetlita aŭ disvolvita teritorio, trans kiu troviĝas sovaĝejo au regiono loĝata de sovaĝaj aŭ barbaraj popoloj.

**Kastrumo.**—romia soldatejo, pli-malpli konstante, fortikigita per remparo, kaj palisaro kaj foso; ĝi havis kvadratforman planon kun du ortangulaj aksoj (stratoj); interne troviĝis armilardeponejo, malsanulejo, loĝejoj por soldatoj kaj oficiroj, laborejoj, banejoj kaj templo.

**Limeso.**—landlimo inter la romia imperio kaj barbarujo, la teritorio loĝata de barbaraj popoloj; ĝi estis fortikigita per remparoj, tranĉeoj, palisaroj, gvatturoj kaj fuortetoj.

**Norikumo.**—romia provinco okupanta la teritorion de Aŭstrio sude de Danubo ĝis Alpoj, kaj oriente de la rivero Inn preskaŭ ĝis Vieno.

**Panonio.**—romia provinco kreita kune kun Dalmatio post la reorganizo de Iliriko; ĝi ampleksas la hodiaŭajn teritoriojn de orienta Aŭstrio, Hungario sude kaj okcidente de Danubo, kaj la parton de Jugoslavio norde de la rivero Savo.

**Setli** (ntr.) ekloĝi, loksidiĝi aŭ fondi kolonion en nova ĉirkaŭaĵo, regiono aŭ lando.

# NIAJ GRUPOJ

## MALAGA

La aktivaĵoj en la Grupo de Málaga, kie pasintjare okazis la Nacia Kongreso de Esperanto, estas vere interesaj.

Okaze, de la Kultura Semajno de la G. F. U. okazinta la pasintan Decembron prelegis en la «Domo pri Kulturo» pri la temo «Esperanto, lengua Internacional» s-ano Andrés Martín González; sammonate kaj okaze de la naskiĝdatreveno de d-ro Zamenhof, la E-Grupo aranĝis ekspozicion pri E-materialo (ĉefe libroj) kiuj altiris la atenton de ĉiu vizitanto.

Ĉiumonate en la revuo «ENSEÑANZA ANDALUZA», organo de Sate-Ucste (Sindikatoj pri Edukado) kaj de la Pedagogia Movado MCEP, aperigas artikolojn sub la ĝenerala temo: «Esperanto, Pedagogía y Democracia» verkitaj de s-ano Andrés Martín.

La 11-an de Marto kaj kadre de la programo «Loka Informo», estis intervjuata de radioparolisto de la Nacia Radio en Málaga s-ro Andrés Martín, pri la E-movado.

Oni antaŭvidas la okazigon de Elementa Kurso de Esperanto por geprofesoroj de Ĝ. B. E. kaj por profesiuloj de Banko, Komerco kaj Gastigado.

La 10-an de Aprilo kunvenis en Córdoba reprezentantoj de diversaj andaluzaj urboj por pritrakti la okazigon de la Unua Andaluza Esperantista Renkontiĝo.

Ekde la Monato Januaro ĉijare, la revueto de la E-Grupo nomiĝas «CENAĈERO».

A. MARTIN GONZALEZ

## ZARAGOZA

Laŭ informo aperinta en la loka ĵurnalo «HERALDO DE ARAGON» organizita de la Komisiono pri Kulturo de la Urbokonsilantaro de Ejea de los Caballeros okazas en la «Domo pri Kulturo» Elementa Kurso de Esperanto.

## SABADELL

Okaze de la koncerto de la bulgara baritono s-ro Damjanov pri kio ni jam informis en nia numero Januaro-Februaro ĉijare, la loka ĵurnalo titolis sian raporton tiel: «La Voĉo de Esperanto kantis en Sabadell». La recitalo aranĝita de la E-grupo kunlabore kun la muzikaj societoj «Asocio de Operamikoj» kaj «Muzikaj Junularoj» atingis grandan sukceson. La Urbestraro subvenciis la aranĝon, kio permesis eldoni belan dupaĝan programon kaj la Kultura Konsilisto, persone, akceptis s-ron Damjanov kaj prezide ĉeestis la recitalon.

Estus rekomendinde ke tiaj prestiĝaj aranĝoj oftiĝu, ĉar ili plej trafe konvinkas pri la belsoneco kaj utileco de la internacia lingvo. La iniciato la HEF meritas kaj aprobon kaj aplaŭdon.

LL. Puig

## BARCELONA

Omaĝe al la forpasinta samideano Ramón Molera, plurjare Ĉefdelegito de U. E. A. en Hispanujo, Barcelona Esperanto-Centro aranĝas Internacian Literaturan Konkurson. Interesuloj petu la koncernan regularon rekte al Barcelona E-Centro, Carreras Candi, 34, 36 - BARCELONA-28.

## CARTAGENA

La E-Grupo de ĉi-tiu urbo aperigis revueton sub la titolo «Evoluo». La unua numero dekdupaĝa enhavas, hispane kaj esperante, tre interesajn informojn pri la agado de la Grupo «KARTHAGO NOVA». Ni kore bonvenigas la novan informilon dezirante longan vivon.

## VALLADOLID

La E-Grupo «Fido kaj Espero» estis devigata translokigi sian sidejon, kiu nun situas en strato Manteria 31 2º kie ili daŭrigas la laboron favore al la disvastiĝo de nia kara lingvo ESPERANTO.

# Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj


**9-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado,** okazonta en **Graz** (Aŭstrio) de la 6-a ĝis la 13-a Aŭgusto 1983-a.

La ĉefa temo de la Konferenco estas: **Survoje al la 100-jara datreveno de ESPERANTO: Progresado de la preparlaboroj.**

La festparoladon en la solena Inaŭguro faros prof. d-ro Ivo Lapenna en la prelegejo de la Universitato.

**Kongreso de la Belga Esperanto-Federacio,** okazos en **Leuven** de la 9-a ĝis la 11-a de septembro 1983-a.

**Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj**, okazonta en Krossinsee (G. D. R.) de la 12-a ĝis la 25-a de septembro.



**54-a Itala Kongreso de Esperanto**, okazonta en Alghero (Sardinio) traktos la temon: **«Esperanto kaj Minoritataj Lingvoj»**.

La Itala Kongreso okazos de la 14-a ĝis la 20-a de Oktobro 1983-a.

**25-a Jubilea Kataluna Esperanto-Renkontiĝo** okazonta en Sabadell de la 28-a de Oktobro ĝis la 1-a de Novembro.

## CONVOCATORIA A JUNTA GENERAL DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

De conformidad con lo establecido en nuestros Estatutos, se convoca a Junta General Ordinaria que se celebrará en **Zaragoza** el día 23 de Julio a las 6 de la tarde en la sede del 43 Congreso Español de Esperanto (Palacio de Exposiciones y Congresos de CAZAR; San Ignacio de Loyola, 10) con arreglo al siguiente

**ORDEN DEL DIA**

1º Lectura y aprobación, si procede, del acta de la Junta General anterior.
2º Estado de ingresos y gastos de 1982.
3º Estado de cuentas del servicio de venta de libros.
4º Memoria de Actividades.
5º Propuesta de modificación de las cuotas de H. E. F.
6º Propuesta de Normas Reguladoras para la organización de Congresos.
7º Propuesta de sede para futuros Congresos
8º Ruegos, Preguntas y Proposiciones.

EL SECRETARIO

# Notas de interés para todos los federados

## Socios protectores 1982

| | |
|---|---|
| José Bringas | (1.932) |
| Esperanto Centro | (2.426) |

## Socios Protectores 1983

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Jonás Castro | (2.450) |
| 2. | Carmen Alvarez | (2.464) |
| 3. | Jacinto Urueña | (2.437) |
| 4. | Francisca Yruegas | ( 719) |
| 5. | Georgette Lelievre | (2.693) |
| 6. | Antonio Corral | (2.536) |
| 7. | Grupo de Alicante | (2.072) |
| 8. | Manuel Díaz | (1.510) |
| 9. | Rafaela Urueña | (1.904) |
| 10. | Grupo de Valencia | (1.187) |
| 11. | Grupo de Bilbao | ( 847) |
| 12. | Antonio Gil Contreras | 369) |
| 13. | A. Cardona | (2.666) |
| 14. | Soc. Esp. «ESTO» | (1.121) |
| 15. | Consuelo Hervás | (1.975) |
| 16. | Antonio Ferrer | (1.860) |
| 17. | Pedro Marín | (2.661) |
| 18. | Cayetano Mir | (2.664) |
| 19. | María Vila | (2.332) |
| 20. | Florentino Fuentes | (2.062) |
| 21. | Isidro Juliá | (2.614) |
| 22. | Evelio Calvet | ( 811) |
| 23. | Enrique Fueyo | (2.228) |
| 24. | E. Soc. «Frateco» | ( 134) |
| 25. | José M. Claramunt | (1.595) |
| 26. | María Pi Maynar | (2.197) |
| 27. | Club Amigos Unesco | (1.804) |
| 28. | Miguel Termes | (2.510) |
| 29. | José Arroyo | ( 893) |
| 30. | Luis Menchero | (2.677) |
| 31. | A. Petterson | (2.183) |
| 32. | Eleuterio Moreno | ( 998) |
| 33. | José Palmero | (1.712) |
| 34. | Ramón Diago | (2.150) |
| 35. | Domingo Domenech | (1.594) |
| 36. | Marisol Romero | (2.673) |
| 37. | Diego R. Biedma | (2.574) |
| 38. | José Manuel Cantera | (2.628) |
| 39. | Julián Perdiguero | (2.675) |
| 40. | Alfonso Escamilla | ( 623) |
| 41. | Jerónimo Aguado | (2.678) |
| 42. | Rodolfo Canet | ( 477) |

## Donativo para la «FUNDACION ESPERANTO»

| | |
|---|---|
| Eleuterio Moreno | 2.000 pts. |

## Donativos para la Federación

| | |
|---|---|
| Ada Fighiera | 500 pts. |
| Angel García | 250 pts. |
| Krystyna Goralski | 300 pts. |
| Luis Martín Herrero | 250 pts. |
| Emiliano Lorenzo | 250 pts. |
| Clementina Tranque | 5.000 pts. |
| Grupo de Alicante | 500 pts. |
| Manuel Díaz | 300 pts. |
| Magda Clerch | 250 pts. |
| Luis Gilpérez | 50 pts. |
| Enrique Fueyo | 200 pts. |
| Giordano Moyá | 250 pts. |
| Luis María Hernández | 350 pts. |
| Pedro Alcedo | 100 pts. |
| E. Soc. «Frateco» | 500 pts. |
| Dolores Andreu | 50 pts. |
| Suma y sigue ......... | 9.100 pts. |

# ELDONA FAKO DE H. E. F.

Je la dispono de niaj membroj kaj amikoj, ni havas jenan liston da libroj kaj broŝuroj.

| | |
|---|---|
| LA INĜENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA, Miguel de Cervantes, en traduko de F. de Diego, bindita, eldono de Fundación ESPERANTO ........................... | 3.000 pesetoj |
| KUN SOPIRA KORO, —Rimas— Gustavo A. Becquer, trad. F. de Diego ................................. | 250 pesetoj |
| 18aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ, —Tortosa—, Diversaj Aŭtoroj ............................................. | 200 pesetoj |
| LA LANDO DE ALVARGONZALEZ, Antonio Machado, trad. F. de Diego ................................. | 150 pesetoj |
| FILOZOFIO DE FANTOMO, W. Fernández Flórez, trad. L. Hernández ............................... | 60 pesetoj |
| ETERNECO, —Navarra Legendo— Amalia Núñez Dubús .. | 40 pesetoj |
| HECHOS FUNDAMENTALES ACERCA DE LA LENGUA INTERNACIONAL (Esperanto), Ivo Lapenna, (Bazaj faktoj...), trad. N. López Escartín ............................. | 30 pesetoj |
| EL PROBLEMA LINGÜISTICO EN LAS RELACIONES INTERNACIONALES, Ivo Lapenna (La lingva problemo...), trad. Inés Gastón ................................. | 40 pesetoj |
| SFEROJ, Diversaj aŭtoroj kaj tradukintoj, Kompilis, Miguel Gutiérrez (Liven Dek). ............................. | 500 pesetoj |
| En eldono de Fundación ESPERANTO, ni liveras ankaŭ MEMORMEDALO pri Dro. L. L. Zamenhof ............... | 600 pesetoj |

* * *

Prezo de la libro SFEROJ estas malsama por eksterlando ol por Hispanujo, por eksterlando, la prezo estas 17,50 guldenoj. La konstanta devaluto de la peseto estas kaŭzo de tiu decido.

Por minimuma mendo, kvin ekzempleroj de sama titolo, ni donas 25% da rabato.

Mendoj kaj pagoj, ĉe Inés Gastón, Eldona Fako de N. E. F., Pº de la Constitución 35-4º dcha. ZARAGOZA-1 Hispanujo.

# FUNDACION ESPERANTO

## Memoria-resumen de la labor realizada por la Fundación «Esperanto» y del estado de fondos de la misma

Durante el año 1982, no se produjo cambio alguno en el seno del Patronato de la Fundación ESPERANTO, por lo tanto pudo realizarse la labor tal como estaba programada.

### LABOR REALIZADA

Como en años anteriores, la labor realizada por la Fundación ESPERANTO se ha centrado en la celebración de concursos. En 1982 el concurso ha sido literario; en él se han otorgado dos premios y accesit correspondiente, para dos temas distintos. El concurso de carácter internacional, fue anunciado oportunamente en el Boletín de la Federación Española de Esperanto.

En este año figura por primera vez el premio «Juan Miguel Piquero» en recuerdo de este benemérito esperantista. Este premio para la divulgación del Esperanto entre niños y jóvenes, está dedicado a literatura infantil o juvenil.

Se recibieron 13 trabajos para el premio «Sancho-Rebullida» dotado con 12.000 pesetas, y accesit de 6.000 pesetas más los diplomas acreditativos.

Para el premio «Juan Miguel Piquero» se recibieron 27 trabajos, el premio, que es anual, está dotado con 10.000 pesetas, y accesit de 5.000 pesetas más los diplomas acreditativos.

En el concurso de este año fueron premiados los siguientes señores:

Premio «Sancho-Rebullida», Ana María Ranero, de Salamanca, España.

Accesit «Sancho-Rebullida», Vladimir Vána, de Plzen, Checoslovaquia.

Premio «Juan Miguel Piquero», Zora Heide, de Tullinge, Suecia.

Accesit «Juan Miguel Piquero», Agnieszka Usakiewicz, de Warszawa, Polonia.

### ESTADO DE FONDOS

Durante 1982, el capital de la Fundación ESPERANTO, ha observado el siguiente cambio: Ha aumentado en un título (10.000 pesetas) de Deuda Amortizable del Estado. Este ingreso viene a incrementar el premio «Sancho-Rebullida».

Del movimiento de fondos se informa en las cuentas presentadas.

El legado dejado en testamento por D.ª Elisa Ferrándiz Vda. de Casanovas, continua sin haberse hecho efectivo, por no haber vendido todavía los herederos, la finca que responde al mismo.

Zaragoza a treinta y uno de diciembre de 1982

INES GASTON

Secretaria del Patronato de la Fundación ESPERANTO

# INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

La Patronaro de la «Fundación ESPERANTO» decidis dum kunsido okazinta la 12-an de februaro de 1983-a organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Estos premio kaj subpremio.

**PREMIO «JUAN MIGUEL PIQUERO»**

Premio, 10.000 pesetoj kun konfirma diplomo.
Subpremio, 5.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj infanaj rakontoj originalaj au tradukitaj, verkitaj en facila lingvo, por ekinstrui esperanton, al infanoj havantaj la aĝon de sep ĝis dek jaroj. La rakontoj povas esti ilustritaj aŭ nur literaturaj. Pro ĝia ebla eldonado la ilustraĵoj devos esti originalaj.

**REGULARO**

1) Ĉiu konkursaĵo ampleksu 2 - 3 foliojn.
2) Ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko: Por la Konkurso de «Fundación ESPERANTO».
3) La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la Konkursanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
4) Kiam publikiĝos la Verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
5) La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 15-a de septembro 1983-a.
   La Verdikto publikiĝos en la Tago de Zamenhof, la 15-an de decembro 1983-a.
6) Oni sendu la tekstojn al Inés Gastón, Pº de la Constitución, 35, 4º dcha. ZARAGOZA-1 Hispanujo.

Zaragoza la 13-an de marto de 1983-a

INES GASTON
Sekretario de la
«Fundación ESPERANTO» kaj de la Konkurso.

# 43-A HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

## LASTAJ INFORMOJ

En la kadro de la Kongreso, Katolika Esperantista Hispana Asocio organizos kunvenon de katolikaj esperantistoj. kiun povas ĉeesti ankaŭ aliaj kristanaj esperantistoj kaj simpatiantoj.

Tiu kunveno efektiviĝos la 22-an de julio je la 9-a horo kaj oni pritraktos tie «La Komunikadon en la Eklezio».

* * *

**Du Simpozioj anstataŭ unu**

La 22-an je la 11-a h. okazos Simpozio pri KOMUNIKADO kaj la 24-an je la 18-a h. oni okazigos Simpozion pri la «Centjara Datreveno de Esperanto». Ĝi estos gvidata de S. Aragay. Celo de la lasta Simpozio: starigi Jubilean Komisionon en Hispanio. Interesatoj petu informojn rekte al la Redakcio.

* * *

Ĉijare oni festas en la mondo la 75-an datrevenon de la fondiĝo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. Laŭ petoj de UEA - Delegitoj kaj UEA-Membroj oni okazigos dum la Kongreso fakan kunvenon pri UEA.

Momente ankoraŭ oni ne fiksis la daton, pro tio, interesatoj kontaktu kun nia ĉefdelegito de UEA, s-ro Juan Azcuénaga.

* * *

Belajn poŝtkartojn, glumarkojn kaj afiŝojn pri la Kongreso havas je via dispono L. K. K. Mendu ilin tuj.

La O. K. anoncas ke ili projektas kompili albumon kiu enhavos fotokopie la tutan Filatelan Ekspozicion de la Kongreso. Interesuloj skribu rekte al la Organiza Komitato, S. Vicente de Paul, 1; Zaragoza-1.

Prof. d-ro Juan Régulo Pérez, membro de la Akademio de Esperanto, prelegos esperante en la kadro de la ĉijara Hispana Kongreso.

# LA FIVORTO

Inter la pluraj komunikiloj ekzistintaj kaj ekzistantaj, unu ekzistas kiun la homaro preteratendis. Ĉar estas preskaŭ certe ke vi ne divenos, la respondo estas: la fivorto.

Estas pro io ke Kamilo Jozefo Cela decidiĝis publikigi sian «Sekretan Vortaron», kie oni eblas eltrovi ĉiujn imageblajn fivortojn kaj ĉiujn koncernajn vortojn samfamiliajn. Kompreneble, fivorto dependas pli laŭ la eldira intenco ol la vortsignifo mem. Cele komprenigi min, oni mencios, ekzemple, tiun puritanan maljunuleton kiu, ĉe kunsido, minacis la ĉeestantojn per dirotan fivorton, kiel deliberiĝo antaŭ tiom da provokoj al li direktitaj. Kaj jen, li ekkriis:

—Kanarioj!

—Sed tio ne estas fivorto -, la kunsidanoj diris.

Responde, li rimarkigis ke temas pri «salona fivorto», kiel tiu rilatanta al la mezepokaj puntaj manumoj el kiuj devenas la nuntempa malŝatata kastilia vorto neplaca, ekzemple, al markizinrondo, ĝuste ĉar tiutempe oni alsendis la homojn fari tiajn vestaĵojn.

Sed, mi volas rakonti al vi pri la ebleco uzi fivorton kiel komunikilon, kaj, origine de tio, du anekdotojn kiuj bone bildumos la temon.

Kataluno ŝipveturante de Eŭropo al Hindujo, kiam la vaporo konsistigis la plej efikan ilon tiucele, estis devigita halti en egiptuja haveno. Starante kaj sinapogante sur la promenferdeka manrelo, li observadis la kajon por trovi portiston, kiu helpos al li transporti valizon. Sur la kajo, atendante, staris kelkaj portistoj, kiuj vestis tunikon kaj turbanon. Nia ĉefrolulo, de sur la ferdeko, ekkriis: «Ep!», klasika kaj konata kataluna voka esprimo. «Ep!» pensis unu el la portistoj starantaj ĉe la kajo. Tiu, tuj sin turnis al la vojaĝanto al kiu li demandis, katalune, el kiu lando li devenas.

—Mi naskiĝis en «Sabadell».

—Bonege! Mi devenas el «Palamós».

Temas nur, ĉi tie, pri simpla interjekcio. Do, mi pluiru. Alia vojaĝanto, troviĝis plenumante mision en «Ĉongking», ĉinuja urbo ĉe la rivero Jangzio. Iun tagon, oni invitis lin ekskursi en la rivero. Unu el la remistoj de la boato manfrapis sin per remo, kaj li tuj elkraĉis fivorton ege maldecan. Kiom la invitito surpriziĝis aŭdinte tia vulkana eksplodo en sia lingvo, tia familia esprimo, eldirita de buŝo de remisto surhavantan ĉemizbluzon kaj ĉinian ĉapon, tiom malproksime de la hejmo!

Dialogo rapide stabliĝis, el kiu tuj fontis amikeco.

Kiel vi vidas, vulgara interjekcio estas ankaŭ komunikilo, rudimenta, jes, sed multfoje efika. Notu tion la sociologoj kaj la specialistoj pri homrilatoj. Kaj se tiu ĉi rakonto ne konvikas vin plene, almenaŭ vi interkonsentos kun mi ke «se non è vero, è ben trovato».

**Josefo-Maria Pi**

# HISPANA LIRIKO

Manuel Machado y Ruiz, frato de la eminenta, karmemora poeto Antonio Machado, naskiĝis en Sevilla, 1874, kaj mortis en Madrido, 1947. Kvankam ne tiel fama kiel lia frato, Manuel Machado riĉigis la hispanan poezion per kelkaj pecoj, kiuj vivos tra la tempoj tiel longe kiel la lingvo mem.

**Kastilio**

Blindiga sun' sin ĵetas
kontraŭ la duraj siluetoj armaj,
per lumo vundas helmojn kaj kira-
[sojn
kaj glime sparkas sur la pintoj lancaj.

Blindiga sun' soifo, morta laco.
Sur kastilia stepo nude aspra,
al la ekzil' kun deko da kompanoj
—polvego, ŝvito, fero— Cido rajdas.

Fermita la gastejo tute tuta.
Respond' ne venas. Per la puŝoj
[glavaj
kaj batoj halobardaj, la pordego
ekcedas... Suno boras, vento ardas!

Ĉe la teruraj batoj
eĥantaj rauke, pura voĉ' kristala
respondas. Kaj knabino
tre febla kaj tre blanka
sursojle estas, tuta
okuloj bluaj, kaj l' okuloj larmas.

Or-haroj palaj nimbas
la vizaĝeton time bas-rigardan.
«Enpaŝu, bona Cid'. Nin reĝo buĉos,
la domon rompos plata,
kaj ĉi kampeton, kiun patro plugas,
surkovros cindro sala.
Foriru... Dio vin kaj viajn benu.
Per nia noco vi nenion gajnas».

Silentas la knabin', singultas softe.
La skadron skuas ploro-ĝem' infana
el krudaj batalantoj.
Kaj voĉo nefleksebla: «Marŝ!», ko-
[mandas.

Blindiga sun', soifo, morta laco.
Sur kastilia stepo nuda aspra,
al la ekzil' kun deko da kompanoj
—polvego, ŝvito, fero— Cido rajdas.

Manuel Machado

**Trad. F. de Diego**



# RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

SEMINARIO PRI APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO.—20 referaĵoj pri energio, aviado kaj problemoj de fakaj lingvoj, (aŭtoroj el ses landoj). Broŝuro, mimeo, 94 paĝoj. Eldonita de Ĉeka Esperanto-Asocio scienca-teknika sekcio, 1982. Prezo ne indikita. Aĉetebla ĉe E-libroservoj.

La libreton mi devis unutire legi dum unu sola sidado, tiel atentokapta ĝi estas. Ĉar, aldone al la teknike faka intereso kaj denseco, preskaŭ en ĉiu referaĵo vidiĝas jen aferoj de ĝenerala intereso, jen por sportemo; jen unu surprizas per sia koncizeco, alia per sia flua lingvaĵo, tria per sia bela stilo. Krome, al tiuj interesoj ĝenerale homaj aldoniĝas informoj kaj faktoj gravaj por homoj okupiĝantaj pri la monda lingvo-problemo.

1) Referaĵo pri «Energio - tutmonda problemo». Ja ne eblus mencii tie ĉi eĉ parton de la esploroj pri novaj teknikoj kaj pri novaj fontoj nuntempe esplorataj. Ni parolu, do, nur pri la perspektivoj kiujn la lego trudis al mi: Ni ja frontas plej gravan energi-problemon; rilate ĝin, ni devas esti nek tro pesimismaj, nek tro optimismaj, sed ja simple sobre serenaj; se ni saĝe kaj ŝpareme agados, ni sukcesos trapasi la nunajn malfacilaĵojn, survoje al estonteco pli hela ol nun, al estonteco akcepteble hela.

2) Tute same, estus tro longa eĉ nura cito pri la aviada parto. Ni citu nur kelkajn erojn, kiuj espereble estas ĝenerale interesaj: Ebleco ekzistas, ke hidrogeno anstataŭos la benzinon por motoroj (kroma avantaĝo; malpli de polucio); ke probable ni baldaŭ revidos revenon al avioj kun helicoj (tamen, similaj al multpadelaj mezgrandaj ventoliloj); ke eventuale la aloj estos antaŭen klinitaj (do, inverse al la nuna muntado), ktp. ktp.

3) En la lingva parto oni informan nin pri la grava plano disvolviĝanta en Budapeŝto por rigora terminologia laboro; kaj oni publikigas studojn pri la tekniko de Zamenhof rilate fakterminojn, pri la konataj kvardek (preskaŭ) novaj afiksoj de Karolo Piĉ, kaj pri tio kio devas esti nia agado rilate «INFOTERM» kaj «International Standardising Organization» kaj la tieaj klopodoj de Interlingva.

Ni ne povus valorige juĝi pri la citita afiksaro. Tamen, ni agnosku ankaŭ tie ĉi ke, tute sendepende de ties eventuala (mal) akcepto, ja TUTE NE temas pri ajna atenco al la Fundamento nek al la vivanta Esperanto, sed ja nur pri provo igi Esperanton eĉ pli nuanciva ol ĝi jam estas.

Iom pri la Interlingva-afero: Antaŭ la apero de tiu projekto, ni ĉiuj supozis pli malpli prave, ke la interlingua problemo estis lingve-teknike jam delonge solvita pere de Esperanto, kaj ke do restis nur la socia-

politika problemo de ĝia disvastigo kaj oficiala akcepto. Nu, post la apero de Interlingua, tiu sopozo iĝis scienca fakto! ĉar se post tiom da (laŭdire) laboroj, tempo, altrangaj fakuloj kaj... dolaroj, oni venis al tia fuŝaĵo. Tiel evidente malsupera al Esperanto eĉ en la stadio de projekto (por ne paroli pri vivantiĝo, Kompreneble), nenia alia konkludo eblas. Tamen, ja tio ne signifas ke eventuala laboro fare de influaj homoj ĉe gravaj instancoj ne povos malutili al la interlingua afero; tial, oni bone trastudu la koncernan referaĵon de la broŝuro de s-ro Plehn; liaj atentigoj kaj konsiloj estas nepre sekvendaj.

4) Resume: La recenzata broŝuro estas plia ekzemplo de tiu ĝojiga ĉiam pli ampleksa uzado de Esperanto en scienco kaj tekniko. Laŭ mia kompreno, en estonteco oni probable sukcesos tenadi same alte la fakan laboron de la Seminario; sed tio ne povos okazi ankaŭ pri ties homara, ĝenerala-interesa kaj ankaŭ esperantisma valoro. Tio ja tute ne estas bedaŭro rilate sciencon, sed je estu nura instigo al legado de la nuna broŝuro por ĉiu esperantisto, ne grave ĉu li estas scienca aŭ teknika fakulo.

**Antonio Alonso Núñez**

---

**DICCIONARIO SIMULTANEO EN 21 IDIOMAS.** Ediciones DISTEIN, Barcelona. 1977, 218 Pgj 20 x 13 cm. Prezo 800 pesetoj. Mendebla ĉe Libro-Servo de HEF.

Ediciones Distein eldonis vortaron kiu enhavas 2.000 vortojn en 21 lingvoj: hispana, germana, kataluna, ĉeka, dana, esperanta, finna, franca, greka, nederlanda, hungara, angla, itala, malaja, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, sveda kaj turka.

Por faciligi ĝian studadon, la vortaro estas dividita en du partoj. En la unua parto estas 2.000 vortoj kun siaj tradukoj en la 21 lingvoj.

En la dua parto oni enlistigis la 2.000 vortojn, grupigitajn laŭ alfabeta ordo en ĉiu el la 21 lingvoj.

Dank'al tiuj du partoj oni povas traduki kaj kompari vortojn facile kaj rapide.

Nur unu makulo pro la granda lingvadiverseco la verko enhavas kelkajn preserarojn.

**S. A.**

**KIU FARU KION.** Gvidilo por plenumo de la programo pri la Centjara Jubileo de Esperanto. A. Brennan, R. Corsetti. Rotterdam 1982, 31 paĝoj. 21 x 15 cm. Mendebla ĉe Libro-Servo de HEF.

Tre interesa broŝuro kiu planas serioze kaj detale internacian programon por la Jubileo de Esperanto.

Esence la celoj de la internacia programo estas la jenaj: Igi la ĉefajn internaciajn organizojn kaj la registarojn de la mondo agnoski Esperanton.

Vaste konsciigi la publikon pri: a) la rolo de lingvoj en la socio; b) lingvaj problemoj, precipe internaciaj; c) la historio, nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto.

Vaste pligrandigi la nombron de simpatiantoj al Esperanto.

Rekomendinda verko por ĉiu esperantisto.

**S. A.**

---

# DEZIRAS KORESPONDI

Kun okcident-eŭropaj esperantistoj, 25 jara komencanta hispana esperantisto; S-ro Juan Fernando Dieguez Pintado; Doce de Octubre, 7-4º **VALLADOLID** (Hispanio).

Hungara lernantino pri ĉiu temo: F-ino Gabriella Mester; Pipacs ut. 107; **NYIREGYHAZA** (Hungario).

17 jara junulo ŝatanta la sporton kaj fotadon kun samaĝaj knabinoj: S-ro Mihalics Gábor; Rákóczi ut. 2; **GYONGYOS** 3.200 (Hungario).

Kun la celo interŝanĝi spertojn per praktika uzado de Esperanto kaj kiel taŭga komunikilo inter diversnaciuloj, la Pola Esperanto-Junularo el **Krakovo** invitas ĉiujn hispanojn skribi al: POLA ESPERANTO-JUNULARO; Straszewsklego, 2/9; **30-960 KRAKOW** (Pollando).

**ĈU VI DEZIRAS TUJ KORESPONDI?**

Petu senpagan liston sur kiu vi trovos diverslandajn korespondemulojn kun klarigo pri aĝo kaj emoj, sed aldonu 18-pesetan poŝtmarkon por la afranko al: Centro de Esperanto Sabadell - Poŝtkesto, 407 - SABADELL.

# NEKROLOGOJ

La 12-an de Februaro 1983-a, mortis 94-jara en Vilafranca del Penedés (Barcelona) s-ro **Ricardo Sans i Compte.** Kurioze, li lernis legi kaj skribi, kiam juna, danke al vizitado de Esperanto-Kurso.

Fondinto de la Klubo de Esperanto en Vilafranca del Penedés, kaj pere de lia influo oni tie inaŭguris straton laŭ la nomo de Zamenhof, okaze de Barcelona-Provinca Esperantista Rekontiĝo, kies precipa organizinto li estis. Al lia familio plej koran kondolencon.

* * *

Kaŭze de koratako forpasis, 84 jaraĝa, **S-ino Pilar Molins Tomás**, Vidvino de Alberich, la 28-an Februaro. Ŝi esperantiĝis en la jaro 1915-a kaj restis por ĉiam fidela esperantistino ĝis sia forpaso. Al ŝiaj familianoj, speciale al ŝiaj bofratoj Tomás kaj Frederic Alberich, ni esprimas nian sinceran kondolencon.

* * *

Ni ĵus sciis pri la forpaso de s-ano Francisco Orts Parach, membro de Hispana Esperanta Federacio (H. E. F.) kiu loĝis en Alicante. Pace Ripozu.

# 43-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(Zaragoza, 21-an ĝis la 25-an de Julio 1983-a
Kongrestemo: **La Komunikado**
**Kongresejo:** Palaco de Kongresoj de CAZAR

KONGRESPROGRAMO

**Lundon 18an Julio**
Malfermo de la 1-a FILATELA ARAGONA EKSPOZICIO PRI ESPERANTAJ TEMOJ, en salonoj de nia Kongresejo, str. San Ignacio de Loyola, 10.

**Merkredon 20an Julio**
Posttagmeze: Oficiala inaŭguro de la Ekspozicio. Disdonado de dokumentoj. Unua tago de la poŝtstampado en la Ekspozicio. Interkona Vespero.

**Jaŭdon 21an Julio**
9,30 h. Kunsido de la HEF-Estraro kun Delegitoj de Grupoj.
11,30 h. Inaŭguro de la Kongreso.
17 h. Ekzamenoj pri Esperanta kapablo, elementa kaj supera.
20 h. Prelego en hispana lingvo.
22,30 h. Junulara aranĝo.

**Vendredon 22an Julio**
9 h. Fakaj kunvenoj.
12 h. Simpozio pri Komunikado.
18 h. Prelego en Esperanto. (D-ro Régulo Pérez).
19 h. Omaĝo al la veteranoj: Arta Esperanta festo.
22,30 h. Junulara aranĝo.

**Sabaton 23an Julio**
9 h. Vizito al la artohistoriaj monumentoj de la urbo per aŭtobusoj kiel invititoj de la Zaragoza Urbestraro.
13 h. Oficiala Akcepto de la urbaj Aŭtoritatoj.
18 h. Ĝenerala Kunveno de HEF.
22,33 h. Folklora Festo prezentata de la fama Arta Aragona Grupo «Baluarte Aragonés».

**Dimanĉon 24an Julio**
9,30 h. Libervola vizito al la diversaj urbaj pinakotekoj.
12 h. Sankta Meso.
13,30 h. Oficiala Bankedo
18 h. Simpozio pri Centjara datreveno de Esperanto.
20 h. Solena Fermo de la Kongreso. Konkludoj.

**Lundon 25an Julio**
7a matene: Tuttaga ekskurso al la Aragona Pireneo: Parko Ordesa. Adiaŭo.

* * *

Rimarkoj: En la Kongresejo funkcios la Libro-Servo de la Federacio.